



16-a Jaro N-ro (173-174) Administracio : Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

Abonprezo: ¥240 por unu jaro; §0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando : Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Triumfa Paŝo de Esperanto

Unesko Agnoskas La Valoron De Esperanto Por La Scienco, La Edukado Kaj La Kulturo

Koncerne la Esperanto-Unesko-aferon en Montevideo ni publikigis en la antaŭlasta numero malfavoran perspektivon por nia afero. Tamen, kun ĝojego ni povas nun raporti al niaj legantoj, ke la afero bone iris. S-ro M. H. Vermàas, en la sekretariejo de CED*, Londono, sendis al ni la jenan flugleteron :

Londono, 22 — 12, 1954

Al la Redakcio de OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Estimataj Samideanoj,

Ĉi kune mi sendas al vi la oficialan tekston de la rezolucio akceptita de UNESKO en Montevideo, ĵus ricevitan de tiea observanto de UEA, D-ro I. Lapenna. Malgraŭ la malfavora perspektivo, pri kiu parolas via numero 7-8 de tiu ĉi jaro kaj kiun afero efektive havis, almenaŭ pli malpli, la rezulto estas bonega. La detaloj pri la okazintaĵoj sekvos poste.

Kun samideanaj salutoj, altestime,

M. H. Vermàas,

anst. sekr. CED

Jen la definitiva teksto de la Rezolucio 8C/DR/116, akceptita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, vendredon la 10-an de Dec. 1954, je la 17.30 horo, en la Granda Salonego de Palacio Legislativo en Montevideo: (Traduko el la hispana originalo):

“La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto,

1) notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

2) rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;

3) instrukas la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj, tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn;

4) notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ

* Centro de Esploro kaj Dokumentado de U. E. A.

La kristanismo en la mateno de l' atomepoko

D-ro A. Halbedl (Aŭstrujo)

Dum la kongreso de la katolikoj de Aŭstrujo en Vieno 1952 ĉefepiskopo D-ro Francisko *Jachym* faris la trafan eldiron: "La katolika eklezio ne estas la noktgardisto de kulturo mort-anta". Tamen tro multaj de la gvidantaj katolikoj klerikaj kaj laikaj ne atentadas ĉi tiun situacion, trokatenite per politikaj kaj ekonomiaj antaŭjuĝoj el la tempo pasinta. Tial la libro de P. Klemento *Brockmüller* S. J.

kun la titolo de tiu ĉi artikolo, eldonita 1954 de Josef Knecht per Carclusdruckerei en Frankfurt/M Germanujo, efikas sensacie, kiel povas kredigi jam jena elĉerpajo kaj kien substrekas la eklezia aprobo de la libro:

"...La rilato inter religio kaj kulturo kaj pli trafe inter kristanismo kiel religio kaj kulturo nepre ne estas tiel klara kaj konstatita, kiel oni ofte opinias. Kulturon formanta forto

ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo."

*

La 25-an de Novembro la Administra Komisiono ĉiuvoĉe akceptis UEA kiel asocion kun konsultaj aranĝoj. Tiu decido estis konfirmita de la Pleno la 6-an de Decembro por akcepto de la raporto pri la laboroj de la Administra Komisiono.

La rezolucio de la 10-a de Decembro estis akceptita per 30 voĉoj kontraŭ 5 kaj 17 sindetenoj. La aliaj ne voĉdonis. Ĉeestis la Konferencon entute 72 delegacioj.

La similan raporton kun la sama teksto de la rezolucio ni ricevis ankaŭ de s-ro Helios Tato rekte el Montevideo. Ni esprimas nian koran dankon al ambaŭ informintoj kaj gratulon al ĉiuj samideanoj, kiuj jam subskribis en la koncerna Petskribo al Unesko, kaj apartan dankon al tiuj, kiuj inkluzive prof. d-ron I. Lapenna aktive trabatalis por ŝanĝi la tajdon favore al Esperanto.

Okaze de la ĝojiga novaĵo el Montevideo ni ĵuru fari multajn sinsekvajn paŝojn antaŭen post la "triumfo" en Montevideo. Kaj la similan paŝon ne forgesu fari ankaŭ en la Movado por Mondfederacio!

La Redakcio.

estas ja propreco de la religio, sed la religiaj fortoj ne estas la solaj fortoj estigantaj kulturon..."

"...La vorto 'kulturo' mem havas multajn signifojn. 'Kulturo estas faraĵo de la homa spirito, kiu en la naturokazajojn kaj datojn rigardatigas sian propran idearon kiel alireblecon kaj taskon de levado sur pli altan ŝtupon kaj dum la efikado de l' evoluo de sia persona kapablo stampas tiun sian idearon en la naturan estadon kaj estiĝadon. Ĝi ne tiom estas la verko de unuopa homo, kiom de grupo aŭ de homa komunajo, se ne de la homa komunajo..."

"...En ĉiu kulturaĵo tri elementoj estas distingindaj: La natura estado kaj estiĝado, la homa libera kreado kaj fine la nova formaĵo el la mastrinta efikado de la dua elemento sur la unua kiel kulturofrukto, kiu apud sia kreiĝado vivas sian propran vivon kaj plej ofte estas opiniata, kiam oni parolas pri kulturo..."

Post la citado de la naturaj kondiĉoj de l' ekzisto de kulturo oni legas:

"...Inter ili ni devas kalkuli ankaŭ la religiajn fortojn, kiuj ja tre intense efikas sur la disformado de la kulturo, sed

dependas de la ceteraj fortoj kunformitaj. Se la naturaj kondiĉoj ne plu ekzistas, tiam la religiaj fortoj ne povas ilin krei aŭ anstataŭi..."

"...La maljuniĝo kaj morto de l' homo unuopa ne estas afero de ties religia konduto, sed de lia biologia forto. Tiel ankaŭ la malnoviĝo kaj pereado de kulturo ekz. de l' okcidento estas unue problemo de la religia konduto de ĝia portanto, do de la germana raso, sed plie male problemo de la *biologia* forto de tiu raso..."

"...Estas fakto ne sole de la sobra statistiko, ke ĉiuj germanaj popoloj montras malleviĝon de la vivolinio, sed plia rashistoria pripensio, ke ĉiuj tre civilizitaj popoloj estas anstataŭataj de biologie sanaj, ĉar simple vivantaj popoloj..."

Recenzinto de la verko opinias, ke ĝia aŭtoro pravas, ke la kristanokcidenta kulturo ja estas aŭ eble estis produktaĵo ankaŭ de la kunkreinta kristanismo, sed por tiu kunefikado de la kristanismo ne devas konserviĝi nepre por ĉiam. Ĝi pereas.

Laŭ la recenzinto P. Brockmüller atingas kun tio la logikan ekscion, ke ĉio, kio pro

la donitajoj de tiu epoko estis laŭtempa esprimo de la kristanismo, do ĉio, kio ne estas el la kerno de la revelacio kaj doktrino estas same kondamnita al morto kiel la mortanta kultur-epoko mem.

Sed la verkinto tre klare demonstras, ke ĉi tio sendube *ne* signifas la finon de la kristanismo, kaj citas pruve la historian evoluon. La kristanismo naskiĝis en la *judan kulturepokon*, en tempon, kiam tiu ĵus estis mortanta. Ankaŭ tiam la praktikistoj, kiuj estis ja judoj, atentigis pri si kaj diris, ke oni nepre devus konservi viva la malnovan kulturon, se oni ne deziras, ke kun ĝi la kristanismo mortu. Sankta Paŭlo estis tiu, kiu eĉ kuraĝis kontraŭi al Petro, la unua papo, pruvante, ke male la kristanismo devas esti gvidata al sia laŭtempa tasko per la akcepto de la idolana, la *romagreka kulturo*, kiu sekvis post la juda, kaj per ties kristana trapenetriĝo. Same la kristanismo ne mortis kun la romhelenika kulturo, kiam ĉi tiu estis anstataŭata de la *germana*. Kio en ĝi mortis, tio estis ĉiam la laŭtempa formo ekstera. Same ĝi ne mortos, kiam tiu tiam nova formo, kiun ni hodiaŭ nomas

kristana-okcidenta kulturo, nun en la komenciĝo de l' *atomeboko* mortas pro elĉerpiĝo de la biologia forto de ĝiaj portantoj.

Brockmüller skribas pri tio precize: "La kristanismo ne devas halti ĉe kulturformo, sed havas mision al ĉiuj homoj kaj pri ĉio. *Kiam ia kulturformo sian taskon plenumis kaj naniĝas, tiam tro rigida sinfiksigo al ĝi pro la kristanaj valoroj en ĝi fariĝas malkonfeso pri la tasko de la kristanismo.* Eĉ la kadukiĝo de la vivo kristana (aŭ de tio, kion momente oni opinias devi kompreni kiel ĝin) kaj la persekutado al la kristanismo en alia formo de kulturo ne estas nepraj kontraŭargumentoj. Tre facile povas esti, ke la esprimado, kiun la religio ricevis ligite al certa kulturformo, ne plu simpatiigas penseman kaj vivecan homon, eĉ se ĝi ŝajnigas al tia homo la religion mem kiel transvivan kaj suspektan. Tiam tiu esprimo de religiaĵoj, kiu pli frue kaj en aliaj cirkonstancoj estis helpo por religia seriozigo de la homa vivo, fariĝis malhelpo. Kial Dio ne permesu ĝian neniigon, se (Liaj servistoj) pro kompreneblaj kialoj (·) ne ekhavas por ĉi tio la kuraĝon kaj konsenton?"

Dua Azia Kongreso por Mondfederacio

1-5 Nov. en Tokio, 8-14 Nov., 1954 en 4 Urboj

Venis la Tempo por Unu Mondo!

Sonorilo sonoras pri la Tagiĝo por la Paco!

La homaro anoncis disiĝon kun la infere nigra estinteco kaj nun estas skribonta la novan paĝon de la mondhistorio por nova luma estonteco.

La pasinta historio estis de la disdividitaj teritorioj, de la kontraŭstaro kaj batalo de nacioj kontraŭ nacioj. En la pasinteco ripetigadis senĉesaj konfliktoj inter konkerintoj kaj konkeritoj aŭ "okupantoj" kaj "okupatoj". Tie regadis la leĝo "Malfortaj estas ĉiam kaptaĵoj de fortaj"; la tutan tempon akompanis subpremoj kaj mizeroj. "Potenco" estis la plej granda aŭtoritato antaŭ ĉio; kie potenco regis, tie justo, moralo kaj saĝo estis senefikaj. Sub potenco ĉiu barbarado estis nobligata kaj ĉiu maljustaĵo justigata. En tia hipokrita mondo la homoj penadis serĉi la pacon kaj feliĉon sub la erara koncepto, ke la alportanto de paco kaj feliĉo estas la potenco mem. Kaj ili fine post sia pena studado inventis la nukleajn armilojn, kiujn oni fiere nomas la plej supera scienca elpenaĵo de la nuna jarcento. Epokfara kaj mirinda, ĝi ja tamen estas monstraĵo, kia povis naskiĝi nur en la mondo de l' diabla superfortado!

La hidrogenbomb-eksperimento de Usono kaj Sovetunio ne estis por la paco kaj feliĉo de l' homaro, sed por la celo testi kaj demonstracii kian grandan detrupovon havas la bomboj. La nuna portempa internacia paco nur ŝajnas esti garantiata per la potenco de timigo de grandaj ŝtatoj pri la minaco de ĉi tiu "grandioza detrupovo". Ne vera paco ĝi estas! Sen timo pri tia minaco, la mendo nepre falus en ĥaoson kaj senbrida buĉado kaŭzus la pereon al la homaro.

D-ro Jukaŭa, japana Nobel-premiita fizikisto, diras: "La homoj emas koncepti, ke ĉiuj korinklinoj estas homecaj, nur se tiuj naskiĝas en la koro de l' homo. Tamen inter la impulsoj, kiuj ekpuŝas la homojn al ago, troviĝas tiaj, kiujn ili heredis de la pratempo kiam la homaro ankoraŭ estis sur tiel malalta kultur-nivelo ke oni apenaŭ povas nomi ĝin homspeca. Ekzemple, la konkeremo kaj krueleco necesaj por la vivbatalo de la bestaro ankoraŭ nun obstine restas en la koro de la homoj, kaj ĝuste tiaj estas la balasto por la progreso de l' homaro. Se oni agnoskus ilin homecaj nur pro tio ke ili estas homaj sentoj, la ekzisto de l' homoj jam per tio fariĝas nesekura."

La homoj ĝis nun ne nur miskonceptis siajn sovaĝajn ecojn neeviteblaj homecoj, sed eĉ uzis ĉi tiujn pozitive tiel, ke ili neniam sukcesis akiri la pacon

kaj feliĉon, kiujn ili tiom aspiradis en ĉiuj periodoj de la historio.

La moderna homa aflikto estas la fruktiĝo de la iluzioj de la pasinteco, kiujn la homaro mem elfaris.

Tamen, en la abismo de la aflikto la homoj komencis vekigi je siaj aliaj instinktoj — veraj homaj naturecoj, kiujn la religio nomas diecaj aŭ budaecaj.

La homa mondo unueciĝas ĉiam dank' al la evoluado de l' scienco kaj teknikoj. La solidariĝo de l' homaro jam estas konfirmita kiel la natura tajdo de l' historio; la leĝo de la komuna interrespondeco estas pli observenda, ol iam antaŭe. La mezepoka izoliteco jam ne plu povas esti permesata. Nun estas la ebleco por "Unu Mondo" kaj la principo de l' konekzisto kaj kunprospero estas decida kondiĉo por tio. Nuntempe, oni povas aserti, ke kiuj ne kapablas konscii pri la ideo de la mondfederalismo, estas iluziuloj de la pasinteco, se ne malsaĝuloj.

La principo de l' granda universo por unueco kaj ordo nun postulas sian efektivigon tiel, ke la homa mondo transiru de la malnova al la nova, kie regus la eterna paco. Ĉe la sojlo al la nova epoko, neniu povas haltigi la fluon de la Tempo. Nek homa ideologio, nek alta filozofio estas taŭga, se al ĝi mankas la apogo de la saĝo vekiganta en la fundo de la koro de la homaro.

Sonorilo sonoras pri la Tagiĝo por la Paco! Komenciĝis la konstruado de Unu Mondo! Ĉiuj pacamantoj, ĉiuj federalistoj kun firma decido ekstaris kaj kolektiĝas en unu loko kaj alia por kune realigi la novan Unu Mondon.

Tokia Kunveno, la kerno de la Kongreso, Bolas de kolero kontraŭ atombomboj

Koncentrigante la homan saĝon kaj konsciencan por fondo de l' nova mondo, la II-a Azia Kongreso de Mondfederalistoj komencis sian laboron en la 1-a de nov., 1954, ĉe Nihon Seinen-Kaikan (Domo por Japanaj Gejunuloj) en Tokio. Antaŭ la domo flirtas du grandaj mondfederaciaj standardoj, kaj paro da grandaj florkronoj de krizantemoj metitaj ĉe la enirejo parfumas ĉirkaŭen. Diversnaciaj flagoj sur la podio kaj la granda standardo kun la emblemo de mondfederalismo, pendigita en la centro de la fronta muro, faras la atmosferon konvena por internacia kongresejo. Sinsekve alvenas unuope aŭ kelkope delegitoj, observantoj kaj gastoj, kaj ili rapide plenigas la tutan spacon de la granda halo. La Kongreson parto-

prenis ĉ. du mil ĉeestantoj inkluzive 50 delegitojn el 12 landoj: Hindujo, Indonezio, Tajlando, Filipinoj, Nacianalista Ĉinujo, Kanado, Usono, Izraelo, Svislando, Francujo, Britujo kaj Nov-zelando. 10 minutojn antaŭ la 10-a horo eksonis tra la ejo la ĥoro de la Mondfederacia Kanto. Kantis junulinaj membroj de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro (Sekai-Rempo Kensetu Domei).

Je la 10-a la solena inaŭguro okazis per la saluto de s-ro J. Ŝimonaka, prez. de la organiza komitato. Ĝin sekvis tiu de s-ro T. Kagaŝa, vicprez. de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro. Li esprimis la fortan deziron ke la japana konstitucio eventuale estu la bazo por Monda Konstitucio. S-ro T. Katajama, prez. de Japana Parlamenta Asocio por



La Inaŭguro de la II-a Azia Kongreso ĉe Nihon Seinen-Kaikan en Tokio

Mondfederacio, kiu ekstaris post li por sia inaŭguro parolado, akcentis jenajn punktojn: la nuna monda krizo devas esti forigita per unu fojo por eterne, kaj por tio la ideo de mondfederacio bezonas esti enkorpigita en la meĥanismo de UNO. Poste oni deklamis la vortojn de s-ro M. W. McLean, ĝenerala sekretario de Mondmovado por Federacia Mondregistaro en Nederlando, dediĉitajn al la spirito de la antaŭnelonge mortinta s-ro J. Ozaki, estinta prez. de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro kaj "ĉama parlamentano" oficinta ekde la komenco de l' japana parlamentismo. Ĉe la deklamado, la ĉeestantaro ekstaris kaj ĉe la finiĝo, honoris la mortinton per muta preĝo.

Granda estis la prezentado de multaj gratuloj, fare de eminentuloj diverslandaj, el kiuj troviĝis la nomoj de prezidantoj de ambaŭ Ĉambroj de Repraŭtaro kaj Konsilantaro; s-ro

Tung Ŝjen-kang, ĉina (nacionalista) ambasadoro; prof. Charles E. Martin de Washington Universitato; prof. N. G. Ranga, prez. de Hinda Laborista Kamparana Partio, ktp.

Post la unuanima akcepto de la Kongresa Regulo aranĝita de la organiza komitato la reprezentantoj de la urba deputitaro de Hiroŝima suriris sur la estradon. Unu el ili deklamis la jenan deklaron pri la "Mondfederacia Urbo", kies rezolucio oni varmkore akceptis la 30-an de okt. en la speciala kunsido de la urb-deputitaro:

DEKLARO: "Agante laŭ la deziro de la homaro, por la komuna prosperiĝo kaj konforme al la celado de la Movado por Mondfederacio, ni, tuta urbanaro de Hiroŝima, deklaras kaj juras ke ni faros nian plejblon por la monda paco en kunlaboro kun la popolo de la tuta mondo. Ni konfirmas ke la mondanigita urbo Hiroŝima estos eterne paca kiel la

Hiroŝima de l' tutmondo.

La deklaro de l' urbo Hiroŝima havas grandan signifon por la estonta disvolvigo de la mondfederacia movado inter japanoj. Granda aplaŭdado daŭris longe.

Posttagmeze, antaŭ ĉio oni unuanime aprobis la nomadon de la estraroj de la Ĝenerala Kunveno kaj laborkomisionoj, kiuj konsistas el la jenaj tri:

A. Komisiono per planoj de kaj atingo al Mondfederacio kaj la revizio de la Ĉarto de UNO;

B. Komisiono por malmarmado kaj kontrolo de atom- kaj hidrogenbomboj;

C. Komisiono por reconstruo de la tutmonda ekonomio.

Sub la nove elektita prezidanto, prof. C. E. Martin, oni legis mesaĝojn transmari senditajn el Nederlando, Norvegio, Svislando, Svedujo, Usono kaj aliaj. Menciinde estas ke inter la mesaĝoj sin trovis ankaŭ tiu de prof.



La fasada vido de l' Kongresejo en Tokio

Albert Einstein el Usono.

Proponon iniciatis Formosa delegito kun la temo pri "Formoso en Krizo". La parolinto preskaŭ kun larvo alvokis, ke kun la kolektiva amasorto de tutmondaj pachatalantoj oni ĉiamaniere forigu la nunan danĝerecon ĉirkaŭ Formoso, kiu eventuale kondukus al la tria mondmilito. La problemo estas grava, kaj la ĉeestantaro aŭskultis lin kun la kortuŝita simpatio kaj ĉagreno pri la sorto de l' indiĝenoj kaj tie naskiĝintaj loĝantoj.

Sinsekvis unuopaj klarigoj pri la karakteroj de la tri komisionoj. Post ripozeto, je la tria horo oni komencis la Ĝeneralan Debaton. Pluraj "cratoroj" pritraktis similajn temojn, kiuj koncernas atom- kaj hidrogenbombojn. Speciale kortuŝa estis la alvoko de s-ino Ŝ. Nakano, reprezentantino de Jajzu Virina Asocio en Ŝizuoka Prefektujo. Kun la antaŭparolo "Mia parolado reprezentas ĉiujn voĉojn de la japanaj virinoj ne nur en Ŝizuoka sed ankaŭ en tuta Japanujo", ŝi esprimis la opinion en tute entuziasma sed trankvila tono. Resuma enhavo estas: "Ni virinoj oferas preskaŭ tutan vivon por vartado, flegado kaj edukado al infanoj, la generacio sekvanta. Tamen ĉiam nin minacas milito kaj ĝia preparado. Bikini-viktimoj nun estas en hospitalo, kaj iliaj familianoj for en sia hejmloko pasigas tagojn senesperajn. Kion la familianoj ege deziras, tio ne estas granda sumo da kompense, sed ja la sano por la edzo aŭ filo. La tragikaj efektoj de l' hidrogenbomboj okazis ne sole al la fiŝistoj. Oni informas ke fiŝoj penetritaj per radioaktivo estas nemanĝeblaj kaj abunde forĵetataj en maron. Ankaŭ legomoj sur la tero estas danĝeraj pro la mortigaj cindroj. Malhelpi la radioaktivan penetriĝon estas ekster nia ebleco. Malbeninda estas la produktado

de tiaj danĝeraj armiloj en landoj, kie oni distrupetadas la pacon nur buŝe. Ni nun estas tre ĝojaj, trovinte en tiu ĉi Kongreso novan vojon por nia estonta vivo." Intertempe la indigno de l' aŭskultantaro kontraŭ la uzo de A- kaj H-bomboj pli kaj pli grandiĝis kaj multaj parolantoj rivalis por esti la unua parolanto, kio kaŭzis bruon kaj malordon. La prezidanto, s-ro Ben Javier, Filipina delegito, kun peno sukcesis daŭrigi la programon, ordonante ke ili esprimu sin libere en la koncernata komisiono. La Debato finiĝis kaj komenciĝis la parolado de elokventa s-ro S. Kondoo, reprezentanto de Konferenco de Japanaj Junulaj Federalistoj, pri Emancipo de Kolonioj kaj Dependaj Teritorioj.

Vespere, en la sama Kongresa Halo okazis la Bonveniga Kunveno de Tokiaj civitanoj por la honoro de la delegitoj transmari alvenintaj. Luksaj amuzaĵoj ilin distris kaj kontentigis.

La tuta 2-a tago de la Kongreso estas por la Ĝenerala Debato. Oni pritraktis nur ĉefajn problemojn el tiuj, kiuj antaŭe estas prezentitaj al la organiza komitato. Pro manko de l' tempo oni povis aŭskulti de proponantoj nur la resumajn klarigojn pri iliaj respektivaj enhavoj. Unuaj parolantoj estis destinitaj en la kadro de la problemoj koncernataj en Komisiono A kaj duaj en Komisiono C.

Koncerne Esperanton ekstaris du proponantoj. S-ro I. Deguĉi, prez. de Universala Homama Asocio faris jenan eldiron kiel parton de sia ampleksa propono: En Kameoka Kunveno, kiu okazos en la 14-a, ni estas pretaj diskuti la problemon laŭ la temo, "Oni adoptu Esp-on kiel la oficialan lingvon de la mondfederacia movado". (La sama eldiron estis nur dokumente registrita

kiel neaprobata dum la I-a Azia Kongreso.) La alia propono estis de s-ro A. C. Blatt, usona esp-isto en Tokio kun la teksto: Konsiderante, ke la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo havos la taskon decidi, kian sekvon donu la Internacia Peticio favore al Esperanto, kiun subskribis 492 organizaĵoj kun entute dekkvin kaj duona milioj da membroj kaj ĉ. 900 mil individuaj personoj en 72 landoj, la Dua Azia Kongreso por Mondfederacio en Tokio, esprimas sian plenan apogon al tiu kiopodo kaj esperas, ke UNESKO kuraĝigos la pluan disvastigon de Esperanto en la intereso de pli bona internacia kompreniĝo kaj de la tutmonda paco. (La rezultaton oni povas legi sub alia speciala ĉapitro pri la sama afero, sur p. 176.)

En tiu ĉi tago s-ino Naohi Deguĉi, gvidantino de Oomoto-movado, montris sian entuziasmon al la Kongreso per la memvola ĉeesto kiel observanto.

La 3-a tago, kaj la antaŭtagmezo de




Parto da delegitinoj sur la podio. De maldekstre: f-inoj Lucy Law, Helen F. Topping, s-ino H. Høglund kaj f-ino Helen Callbeck

l' 4-a estis uzataj por komisionaj laboroj, kiujn oni faris en apartaj ĉambroj de la sama Domo. La komisiono A havis pli multajn partoprenantojn ol aliaj du. En ĉiuj komisionoj okazis seriozaj, entuziasmaj, foje eĉ flamaj diskutoj pri diversaj proponoj, kiuj entenis multe pli konkretajn kaj aktualajn problemojn politike, ekonomie kaj kulture ol tiuj en la I-a Azia Kongreso (Hiroŝima en 1952). Tamen, por diri la veron, ĉiu komisiono havis tro da proponoj por profunde studi ilin en mallonga tempo. Tial nemalmultaj el ili estis komisiitaj post mallonga debato aŭ eĉ sen debato al la komisionetoj por dispono, kiuj respektive fondiĝis el membroj de libere elektitaj eminentuloj kaj memvolaj fervoruloj.

Posttagmeze, sub la aranĝo de la metropola oficejo 50 gastoj, ĉefe eksterlandaj delegitoj, faris peraŭtobusan viziton al vidindaĵoj en la urbo. Paralele kun tio parto da delegitoj okazigis en Tokia Gasto-Halo la II-an Rondtablan Konferencon de Azia Kooperativa Movado.

La 5-an tagon, la lasta tago de Tokia



Parto de la Kongresanoj: delegitoj sur la teretaĝo kaj observantoj sur la unuaetaĝo.

Kunveno, oni havis raportojn de tri komisionoj kaj poste debatojn kaj adoptojn rilate 6 rezoluciojn finaranĝitajn de la komisionoj.

Poste s-ro I. Deguĉi, komisionano kaj prez. de UHA, laŭte proklamis la tekston de Kongresa Deklaro. La historia Deklaro, kun iom da revizio, unuanime akceptiĝis per tondro da aplaŭdoj.

Deklaro

La homaro nun staras sur la vojkrucio — antaŭ la alternativo: ĉu ekstermi sin per atom- kaj hidrogen-bomboj, ĉu vivi en prospero sub la sistemo de Mondfederacio.

En 1952 ni jam esprimis per la "Hiroŝima Deklaro", ke ni rezignas militon, postulas ne nur la forigon de atombomboj, sed la senarmigon al la tutmondo, kaj elektas la vojon al la prospero de l' homaro sur la bazo de Mondfederacia sistemo.

La teknika progreso de interkomunikado ĉiam pli devigas la mondon al Unueco kaj la evoluado de produktaj rimedoj pli kaj pli necesigas la kunhelpadon de l' tutmonda homaro. Aliparte, la apero de hidrogenbomboj ordonas al nia konscienco,

ke la milito estu definitive neebla. La ideo de "Monda Ŝtato" jam eniris la stadion de praktika neceseco, traŭrinte la fazon de dezirindeco.

Tamen, mondaj ŝtatviroj ankoraŭ penadas solvi la internaciajn disputojn per diplomataj negocoj kaj kolektiva sekurigo bazitaj sur armado. Kia anakronismo!

Nun estas la tempo, kiam ĉiuj mond-federalistoj devas antaŭenigi la Movadon por Mondfederacio per konkretaj planoj por malarmado, komencante per la tuja ĉesigo al la produkto de atom- kaj hidrogen-bomboj kaj ties eksperimentoj, kaj per tio ĉi kunlabori por la starigo de l' mond-paco. La Ĉarto-revizia Konferenco de UNO okazos en 1955. Urĝas, ke ni maksimume utiligu la okazon por la efektivigo de nia idealo.

La Dua Azia Kongreso por Mondfederacio, okazigita ĝuste en Tokio, kie ankoraŭ postregas la teruro pri la tragika rezulto de la Bikinia eksperimento per hidrogenbomboj, decidas savi la homaron el la timo de mepereigo, liberigi ĉiujn naciojn el la ŝarĝo de armado kaj realigi la prosperon de la tuta homaro, fondante la mondan socion per senarmilaj klopodoj kaj starigante la Federacian Mondregistaron, la federacian parlamenton, kiu estas elektota de la tuta loĝantaro sur la terglobo, kaj kiu funkcios aldome al la Ĝenerala Kunveno de la nuna Organizo de l' Unuiĝintaj Nacioj.

La 5-an de Novembro 1954

La Dua Azia Kongreso por Mondfederacio

Resumoj de Rezolucioj faritaj en Komisiono A

Planoj por kaj Atingo al Mondfederacio

I. Fundamentaj planoj por Mondfederacio:

La Konstitucio de la Mondfederacio devas en si manifesti, ke la Federacia Mondregistaro traktas nur la aferojn, kiuj komune koncernas la tutan mondon kaj la decido, ĉu tia aŭ alia afero komune koncernas la tutan mondon, aŭ ne, estos farita laŭ la sekvantaj principoj:

- a) La ĝenerala malarmado de l' mondo, la forigo de militoj kaj la nuligo de ĉiuj minacoj al paco, inklude la uzon de atomenergio, devas esti proklamitaj en la Mondfederacia Konstitucio kiel aferoj komune koncernaj al la tuta mondo;
- b) Ĉu aferoj krom la supre menciitaj estas komune koncernaj al la tuta mondo, aŭ ne, tio devas esti decidita en la Mondfederacia Parlamento;
- c) La supre-menciita decido devas konformiĝi al la Proceda Regularo pri prezentado kaj diskutado de proponaĵoj, difinita de l' Mondfederacia Parlamento.

II. Por atingo al Mondfederacio ni devas,

- a) Klopodi kunvoki mondan konferencon por la elfaro de la Konstitucio kaj ĝia adoptiĝo;
- b) Klopodi akceli la fondiĝon de la Azia Paca Regiono, kiu estas sen-defenda, tamen libera de agresoj;
- c) Klopodi fortigi la diversajn funkciojn de l' Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UNO tiel, ke ĝi alprenu la karakteron de superŝtata strukturo;
- d) Klopodi tiel, ke la movado por Mondfederacio ampleksiĝu en sferoj politika, ekonomia, religia, eduka, labora, komunika kaj aliaj kaj la kunhelpado de organizoj en tiuj sferoj estu firmigita;
- e) Klopodi tiel, ke la aktiveco de la Monda Asocio de Parlamentanoj por

Mondfederacio estu varme subtenita kaj klopodi starigi en la Parlamento de ĉiuj landoj Specialan Komitaton por Mondfederacio;

f) Klopodi antaŭenpuŝi la mondanigon de urbegoj, urboj kaj vilaĝoj.

Ni ĉi tie rekonfirmas nian starpunkton ke la supre menciitaj planoj estas akordaj kun la principo de *Satyagraha*, anoncita en la Hiroŝima Deklaro de 1952.

Pri revizio al la Ĉarto de UNO

1. La 10-a Jarkunveno de UNO en 1955 voĉdonu por la kunveno de la Ĉarto-revizia Konferenco de UNO;

2. La Ĉarto-revizia Konferenco de UNO estu kunvokita kun la celo de transformigo de UNO en Mondfederacion;

3. La subtenantoj de Mondfederacio multe pli ol ĝis nun klopodu: a) por interesigi unu aŭ plurajn registarojn en la elfaro, kaj aktuala prezento, de proponoj al la Ĉarto-revizia Konferenco; b) por igi registarojn pretaj subteni la farotan amendon, kiam ĝi estos prezentita de unu el ili; c) por vekti fortan publikan opinionon por tiu ĉi Movado tiel, ke ĉiu registaro estu gvidata en la celitan direkton;

4. Ĉe la Revizia Konferenco, ni klopodu per efikaj kaj adekvataj rimedoj doni plenan konsideron ankaŭ al la opinioj de l' nemembroŝtatoj;

5. La nuna Kongreso rekonas ke la rezolucio adoptita de la "Konferenco de Ne-membroj de UNO" (okazigita en Tokio en majo, 1954) sub la titolo "Revizio al UNO-Ĉarto por la Realigo de l' Universaleco de UNO" kaj "Proponoj pri Revizio al UNO-Ĉarto" adoptita en Londono en sept. (1954) enhavas tre taŭgajn proponojn por la Revizia Konferenco.

Rezolucioj en Komisiono B

(Ĉi tie nur titoloj estas montritaj.)

Rezolucio pri Malarmado kaj Abolo de Atom- kaj Hidrogenbomboj

Rezolucio pri Universaligo de Milit-rezignado

Rezolucio pri la Situacio ĉirkaŭ Formoso

Resumaj Rezolucioj en Komisiono C

Rezolucio pri Rekonstruo al la tutmonda ekonomio

1. Starigo de internacia mon-sistemo:

a) Reorganizo de la monda mon-uza strukturo;

b) Starigo de internacia pag-sistemo en ne-evoluintaj regionoj, precipe en Aziaj landoj;

2. Antaŭenigo de internacia komerco:

a) Abolo de doganaj baroj, kiuj malhelpas mondan komercon;

b) Starigo de kooperativa komerca organizo en Aziaj landoj;

3. Ekspluato al la tero en nekulturitaj regionoj kaj racia utiligo de l' mondaj naturprovizoj.

Rezolucio pri Emancipo de Kolonioj kaj Dependaj Teritorioj

(La enhavon ni ne montras ĉi tie.)

Je la 4-a p.t.m. oni eniris la Ferman Kunvenon. Post la saluto de s-ro J. Ŝimonaka sinsekve esprimis sian dankon pro la brila sukceso s-ro T. Makino, prez. de Universala Inter-Religia Societo, en la nomo de japanaj delegitoj, s-ino T. Koora, en la nomo de Japana Parla-menta Asocio por Mondfederacio kaj d-ro S. G. Fantie, svisa delegito kaj honora sekretario de ILCOP, en la nomo de eksterlandaj delegitoj. Per la ĥoro de l' Mondfederacia Kanto la 5-taga signifo-plena Tokia Kunveno de la II-a Azia Kongreso finiĝis.



Publika Bonveniga Kunveno en Kameoka

Kameoka Kunveno, la lasta tago de la Kongreso

Post la Tokia Kunveno, dek-kelkaj eksterlandaj delegitoj kaj kelkaj Tokiaj reprezentantoj senlace rondveturis por ĉeesti la Kunvenojn de Nagasaki (8-9 nov.), Fukuoka (10) kaj Hiroŝima (11-12). Manko de spaco ne permesas ĉi tie la detalan raporton pri ili. Tamen, oni ne rapide konkludu ke ili estis malpli grandaj kaj malpli atentataj ol en Tokio. Ne, ili havis apartajn karakterojn kaj signifojn aliloke netroveblajn. La urboj de Nagasaki kaj Hiroŝima por ĉiam estis memorataj dum ĉi tiu Kongreso, tiom pli, ĉar en ambaŭ kreskas pli kaj pli intense aktivaj pacmovadoj depost la tago de la atombombiĝo.

La 13-an, posttagmeze la delegitoj fine alvenis al Kameoka, mondanigita urbo kaj fina Kongresloko. La vetero estis serena kaj la aŭtuna pejzaĝo de Oomoto-teritorio ĉirkaŭita de ruĝiĝintaj aŭ flaviĝintaj foliaroj estis ne nur pitoreska sed trankvila. La Oomoto-

movado (iniciatita de Nao Deguĉi antaŭ 60 jaroj) kaj la Universala Homama Asocio (iniciatita de Majstro Onisabro Deguĉi antaŭ 30 jaroj), havante la aktivan centron en Kameoka, heraldis kaj kriadis la fondon de Unu Mondo, strebadis kaj strebadas al la realigo de la Paca Mondo. Ol Kameoka, neniu alia loko de Japanujo pli taŭgus por bonvenigi la Kongresanojn! La tuta urbanaro de Kameoka, de infanoj ĝis maljunuloj, atendis la hodiaŭan tagon por doni al la Azia Kongreso la sukcesigan finalon. Ili — knaboj, junuloj, maljunuloj kun infanoj, viroj kaj virinoj — flirtigante la mondfederaciajn flagetojn per la manoj, vice staris laŭlonge de l' vojo kondukanta la gastojn al la kongresejo ĉe Oomoto. La alvenintaj delegitoj sentis sin refreŝigitaj de ilia gastama bonvenigo post longa laboro kaj laciga vojaĝo. Pri tio atestas la fakto, ke dum la publika bonveniga kunveno ĉiuj gastoj en sia

paroladeto antaŭ ĉio esprimis bonhumore kaj sprite apartan dankon precipe al la infanoj kaj geknaboj pro ilia bonvenigo. Ĉi tiuj ĝojegis kiam kelkaj parolantoj enmiksitis japanajn vortojn, kiujn ili lernis parkere dum sia mallonga restado en nia lando. La kunvenon partoprenis ankaŭ la reprezentantoj de la deputitaroj de Ajabe kaj Asahi-Vilaĝo, ambaŭ mondanigitaj.

Post la publika bonvenigo, la gastoj enkondukiĝis en la Arto-Fakan Ceramikejon de Oomoto, kie ili konkuris siajn talentojn en gaja atmosfero, aŭ pentrante, aŭ desegnante sur krudaj argilaj pladoj aŭ taso — por prepari al si la veĝaĝ-memoraĵon el siaj propraj "majstro-verkaj" artaĵoj! Sekvis la regalo por ili per japana teo kaj kukoj. Ili noktiĝis ĉe japan-stila hotelo de la urbo, "Rakurakuso".

La tipe japana vespermanĝo de la hotelo ilin plezurigis. La programo de la amuza vespero estis aranĝita de la urbestro. Amuziga estis la vido kiam ili kuraĝe sin miksis en la rondon de japana danco kaj ĉancis per kuriozaj gestoj.

Je la 9-a kaj duono de la 14-a, la Kongreso malfermiĝis en la granda halo

de la Oomoto-Centra Oficejo. En la malferma parolado, s-ro J. Ŝimonaka (de Tokio) honore menciis la multeflankan kaj grandan meriton de Majstro Onisabro Deguĉi, forpasinta antaŭ 6 jaroj. Poste, oni debatis pri la rezolucio, kiun prezentis por fari la Universala Homama Asocio. Seriozaj kaj vervaj diskutoj, ĉar la proponita rezolucio (legu sube) temas pri la plej grava spirita flanko de la mondfederacia movado. Koncerne la temon pri Esp-o kelkaj eksterlandaj delegitoj kontraŭstaris. Je nia bedaŭro oni forstrekis la temon el la rezolucio sub la preteksto, ke mankas la tempo por sufiĉa pritrakto. Post ioma amendo, ĉefe en ĝiaj vortouzoj, la jena rezolucio estis akceptita unuanime:


REZOLUCIO (la enkondukaj vortoj estas ĉi tie ellasitaj)

1. Ni klopodos protekti la fundamentajn homrajtojn por ĉiuj homoj kaj ebligi al ĉiuj homoj tra la mondo, sen rasa kaj nacia distingo, la universalan kaj egalan bonstaton;

2. Ni klopodos kiel eble plej frue liberigi la milit-krimulojn kaj milit-kaptitojn, kiuj ankoraŭ estas detenitaj en diversaj landoj;

3. Ni klopodos forigi religiajn antaŭ-

En la mezo de la ovacio de geknaboj la gastoj iras al la Bonveniga Kunveno.



La Prezidantaro de Kameoka Kunveno: s-roj T. Makino (centro en la unua vico), I. Deguĉi (maldekstre de Makino), L. M. Chakradeo (dekstre de Makino) kaj f-ino H. Callbeck (dekstre de Chakradeo).

juĝojn, ebligi la reciprokajn manĝmadon de ĉiuj religiaj eklezioj kaj sektoj de la mondo kaj fari nian plejblon por la universala klerigo de la tuta homaro.

Post la la dankesprimado de du gastoj, japana kaj eksterlanda, en la nomo de la tuta delegitaro, oni fermis la Kunvenon. Estis iom post la tagmezo.

Ĉiuj eksterlandaj kaj kelkaj japanaj delegitoj aŭtobuse veturis al la rivero Hozu. Ili ĝuis la du-horan ŝipet-veturon malsupren laŭ la rapidfluo ĝis Saga, antaŭurbo de Kioto, preterpasante la piedon de l' monto Araŝijama, adorata de ĉiuj turistoj pro la tut-jara pitoresko de la vidaĵo: la ĉerizfloroj en printempo, boat-remo kaj naĝado en somero, belkolora arbo-foliaro en aŭtuno, kaj la neĝo en vintro. Bonŝance la vetero kaj la sezono favoris la gastojn. Ili ĉiuj en kvar boatoj malsupren veturis kaj hur-

kriadis: Mirinda! Belega spektaklo! La skribanto de tiu ĉi raporto esperas, ke la "aventuro" estos por ili la plej neforgesebla, la plej kara kaj bela memoraĵo de la tuta Kongresa periodo!

Vespere, ili ĉeestis la novan Bonvenigan Kunvenon de Kioto, kiun oni aranĝis en Hotelo Mijako, Kioto. Kaj per ĉi tiu kunveno fine finiĝis la tuta programo de la Dua Azia Kongreso por Mondfederacio.

La nomoj de la delegitoj venintaj al Kameoka: s-roj L. M. Chakradeo, negocisto, V. B. Shetty, komercisto, P. V. N. Acharya, teknikisto kaj S. N. Chakravarty, prof. de Kioto Fremdlingva Kolegio, Hindujo; d-ro Omar Moyo Stamboul, kuracisto, Indonezio; s-roj Paul A. Chua, studento de Tokio Suisan Daigaku, kaj A. Uthai, teknikisto, Tajlando; s-roj Ben Javier, redaktoro de Asia Report, kaj

Adolfo Ramirez, Filipinoj; s-ro Lin Ĵung-ĉang, politika kritikisto, Formoso; f-inoj Helen Callbeck, membroj de Unuiĝintaj



S-ro Ben Javier ĉe l' ceramikejo

Mondfederalistoj kaj Lucy Law, ĝenerala sekretario de Konferenco de Junulaj Federalistoj ĉe WMWFG, kaj s-ro Philip Williams, prof. de Toohoku Universitato, Usono; d-ro Silvio G. Fantie, honora sekretario de ILCOP, Svislando; s-roj Toraji Makino, Morikacu Inagaki, Jasabro Ŝimonaka, Kanĵi Koŝio, Japanujo ktp. (Entute prok. 70 delegitoj ĉeestis.)

Ĉi tie mi prezentas al la legantoj la poemon de s-ino Naohi Deguĉi, kiu ĉiam kun gastama rideto partoprenis ambaŭ kunvenojn, Bonvenigan kaj Kongresan en Kameoka. Jen ŝia poemeto-mesaĝo al la Kongreso:

Se en printempo
Ekkrakas frost' glacia,
Jam estas tempo
Por mondo familia: —
Jen falas mur' nacia!

Mistraktado kontraŭ Esperanto

La kongreslingvoj estis japana kaj angla same kiel dum la I-a Azia Kongreso antaŭ 2 jaroj. Kelkaj talentaj tradukistoj estis preparitaj kaj bone funkciis. Ilia lerta uzado de la angla lingvo estus por kelkaj objekto de envio. Tamen niaj legantoj povas konjekti el siaj spertoj, kian rezulton alportas tia internacia kunveno, kie fremdlingvanoj devas kontentiĝi je resumitaj enhavoj sen la emocio kaj delikataj nuancoj, kiujn esprimis la parolantoj. Cetere, la tradukistoj ĝenerale estas ŝparemaj pri siaj vortoj, escepte kiam parolanto postulas po-paragrafan tradukon. Ankaŭ okazas, ke kelkaj "proponantoj" tute

ignoras la lim-tempon al si permesatan detale insistante pri sia opinio. Kaj okazas nemal multe da malordo. Sub la cirkonstancoj la progresado de programeroj nur tedas ambaŭ aŭskultantojn kaj tradukistojn postulante al ili multoblan nervo-streĉon. Kaj malgraŭ ĉio okazas miskomprenoj.

La propono de s-ro A. C. Blatt pri Esperanto (kies enhavon mi jam prezentis en la antaŭa parto de tiu ĉi raporto) estis ĝuste la ekzemplo. Tamen, ankaŭ la proponanto mem devus sur sin preni parton de la respondec. En la komisiono A li faris sufiĉe longan klarigon pri sia temo, metante emfazon

sur la celo de Esp-o. Tio tamen ŝajnis impresi ĉiujn ĉeestantojn, kiel se li rekomendas la tujan enkondukon de Esp-o en la movadon por mondfederacio. Ankaŭ la interpreto ne estis klara. La propono do sendebate transmetiĝis en la sub-komisionon. Menciinde estas ke post li, ekstaris kelkaj, kiuj montris neniel ignoreblan forton en pledado por "Basic English". Nur post du tagoj de la okazo, la komisiona prezidanto, estinta esp-isto, rakontis al unu Oomotana delegito, esp-isto, ke la propono de s-ro Blatt estis akceptita en la sub-komisiono! Sed je miro en la lasttaga Ĝenerala Kunveno oni neniam faris la mencion pri la akceptita propono. La Oomotano protestis kontraŭ la arbitra agado de la komisionanoj. La komisiona prezidanto, kiu antaŭ la Kunveno ekkomprenis la ĝustan kaj gravan signifon de l' propono, kaj estis promesinta al li bonaranĝon por nia afero, tute ne plenumis tion. Kia strangaĵo! Absurda estas ke la tuta ĉeestantaro scias nenion pri tio. Jen estas la vortoj pri Esp-o, kiujn oni forstrekis el la rezolucio en Kameoka Kunveno: "Ni rekonfirmas la utilecon de la neŭtrala lingvo Esperanto kiel la universala lingvo". Kiel menciite, kelkaj delegitoj, ĉefe hindaj, kontraŭis la adopton de la frazo en la rezolucion kun la kialo ke la angla lingvo sufiĉas por internacia komprenigilo. La debato estis nur temporaba diskutado. Kiu ekstaris la unua estis tiu, kiu havas nenian

konon pri Esp-o. Prof. Masao Ooniŝi (Tokio Hoosei Universitato) ankaŭ esprimis sin malfavore al Esp-o en komparo kun Okcidental, Novial, Interlingua kaj aliaj. Kaj jam oni decidis konvencie forstrecki la temon el la rezolucio "por ŝpari la tempon". Nia afero restis registrita en la Kongresa dokumento nur kiel la fakto de propono. Esp-istaj delegitoj, kiuj ĉeestis, kvankam malmultaj, en la Kunveno, volus kaj povus protesti kontraŭ tia unuflanka maljusta traktado, ke oni ne donis al ili ŝancon por refuto. Ili renkontis ne la mokon, sed la indiferenton, eĉ la malŝaton ĉe la aziaj kongresanoj, ke ilia lingva rutino estas subfosata.

Konstatinte la malsukceson de nia pri-Esperanta afero en la Azia Kongreso ni nun povas elmontri du ĉefajn punktojn. Unua; japanaj esp-istoj ĝenerale ne havas sufiĉan konon, nek intereson pri la ideo de mondfederacio. Dua; Aziaj mondfederalistoj ĝenerale ne havas la konon pri Esp-o. Ni urĝe bezonas la klerigan movadon inter esperantistoj pri mondfederaciismo, kaj inter mondfederalistoj pri esperantismo.*

* Redakcia Rimarko. Al japanaj esp-istoj ni rekomendas la abonon de *La Praktiko*, organo de la Universala Ligo (Prezidanto: D-ro Edmond Privat), abonebla ĉe OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu. (Jarkotizo: ¥ 580.—).

La Prepara Kunveno por Tutmonda Religia Kongreso

Por kompletigi nian raporton, ni Prepara Kunveno por la Tutmonda faros ĉi tie informon ankaŭ pri la Religia Kongreso, kiu originis en la

Konferenco de Nemembro-Ŝtatoj de UNO, okazinta en majo de 1^a kuranta jaro kiel la prepara kunsido por la II-a Azia Kongreso por Mondfederacio, en kiu kunsido s-ro J. Ŝimonaka, prez. de la organiza komitato, unuafoje publikigis la planon pri la nomita Tutmonda Religia Kongreso kaj akiris la unuaniman aprobon de la komitato.

La Prepara Kunveno por decidi la detalon de la Tutmonda Religia Kongreso okazis ĉe Higaŝi Honganĵi Templo en Kioto la 13-an de nov., la tago elektita kun la intenco, ke ankaŭ la delegitoj de la Azia Kongreso povu partopreni en ĝi. Ĉeestis tridek eminentaj ĉefoj, kiuj reprezentas diversajn religiajn sektojn de Budaismo, Kristanismo kaj Ŝintoismo.

Laŭ la plano farita en la kunveno, la Kongreso okazos en Kioto dum 4 tagoj t.e. 3-6, majo,* 1955, kaj post la Kongreso delegitoj vizitos sanktejojn kaj templojn en Kioto kaj la Grandan Sanktejon de Ise, kaj ankaŭ la Sidejojn de Tenri-Oomoto- kaj Konkoo-religioj dum 6 tagoj ĝis la 12-a de majo.

Dum la proponita Tutmonda Religia Kongreso, laŭ la unua provaĵo flanke de Japanujo, oni diskutos:

1. Per kia kolektiva rimedo la mond-religioj povas kunagi kontraŭ la nuntempa krizo de la mondo;
2. Per kia kolektiva rimedo la mond-religioj povas kontribui al la fondo de la eterna mondopaco;
3. Kiamaniere la mondreligioj povas kunlabori por efektiviĝi la ĝeneralan bonfarton de la homaro?


La nombro de 1^a partoprenantoj de la Kongreso estos limigita je 100 delegitoj kaj 100 observantoj. Gvidantoj de mondreligioj kaj kulturmovadoj estos invititaj. La sekretario de la kongreso sidos ĉe Higaŝi Honganĵi Templo, Kioto.

Dum la prepara kunveno oni proponis ankaŭ projekton pri la starigo de la Universala Ligo de Mondreligioj en Kioto, por faciligi la interkomprenon kaj kunlaboron inter ĉiuj religioj de la mondo. La afero estis komisiita al la zorgantaro de la kunveno.

La definitivon decidon faros la prepara komitato, kiu baldaŭ organiziĝos.

(N. Esumi)

* Poste oni ŝanĝis la datojn al la komenco de aŭgusto.



Prepara Kunveno ĉe Higaŝi Honganĵi Templo, Kioto

Otokar Brezina

Printempa Nokto

Mallaŭte kantis la nokto. Printempaj akvoj kaj verdaĵ' jun-planta
kunludis kun ĝia kant', melankolie zumanta.
En la alto de la steloj — gigantaj lumkalikoj
de supertera vegetaĵ' — spiris per peza odor'.
La manoj de miaj fratoj, kvazaŭ post morto krucite,
senmove kuŝis, sen konsol', kaj pezaj granite,
rompita de 1^a labor'.

Sed iliaj manoj spiritaj sin streĉis al la steloj,
mil-mil animojn brakis sur Ter' kaj en ĉiuj mond-sferoj.
Kaj longa respiro de 1^a ĝojaj vekiĝoj,
tumulto de 1^a urbo eterna dum fest',
susur' de flugiloj eteraj, ventludoj en grenoj misteraj,
tonoj de orĥestroj altsferaj
leviĝis laŭ la takto de tiu mistika gest'.

El la ĉeĥa: Tomáš Pumpr

Otokar Brezina

Ditirambo de la Mondo

La radiantaj naskiĝoj kaj estingiĝoj
de milionoj da Sunoj
frakasigas en la mallumon de Tempo
en longaj, rapidaj fulmoj,
kiel respeguliĝo de lumo
sur la klingo de grefta tranĉilo
ĉe ĉiu fetra movo de la mano
de 1^a Majstro.

La mondoj sinsekvantaj en la mistero de tempo!
Gigantaj printempoj de eterna tropiko!
Tapiŝoj de misteraj ŝtupoj!
Pulsoj de rejuniga sango!
Ĉiam kaj ĉiam revenantaj,
ĉiam pli spirite tondrantaj

uraganoj de pasioj!

Flugilhavaj semoj, flugantaj dum jarmiloj,
kapablaj ĝermi eĉ meze de fajro!
Plezuro de semanta mano, duonfermita!
Ŝpruco de arĉa greno tra la abismoj de l' kosmo,
de la Galaksio!

Lazuroj de sennombraj teroj, lumantaj kiel printempaj miozotoj
sur la bordoj de la ekstaza rivero,
kiu flugas en la malfermitan disbrakon
de via maro!
Bolantaj kirliĝoj, kunportantaj frakasitajn glaciojn
de sur la arktaj altaĵoj:
kristalajn eskadrojn
de la mortintaj mondoj!
Golfaj fluoj de amo!

Sanktaj rikoltoj de la Vorto!
El fonto de ĉiu grenero:
rivero da spikoj!
Super ĉiu loko, kien ĝi enfalis,
eĉ super la pleje kaŝita,
miloj da fajrantaj Julioj.

Spiritaj kosmoj!
Naĝantaj ĝardenoj, ebriaj de la birdaro,
teroj de revado!
Protuberancoj de kreaĵoj Sunoj,
sparkantaj per ardantaj rozoj!
Mondojn bruligantaj,
mondojn estingantaj
ciklonoj de justeco!

Kaj ĉiuj sunoj
rondirantaj ĉirkaŭ la Eterna Suno,
la Nevidebla,
la Atendanta brilantan tombon,
la Kaŝanta misteron
de nova Kosmo,
la Silentema!

Sur la lipoj, kiuj ame tremas
kiel en bonodora-vento,
forta kaj viviganta,
trans la oceanojn

sonas via kanto, ho sinjorino,
al la ĵusnaskitoj.

Lulkanto de milionoj,
skuante tutan kosmon,
en kies ritma takto
balanciĝas la dolorplenaj teroj,
luliloj de spiritoj!

El la ĉeĥa: Tomáš Pumpr

Otokar Brezina (1868-1929), ĉeĥa poeto de profunda erudicio scienca, filozofia kaj arta. En ekstazaj vizioj li enrigardas la misterojn de la Universo kaj en la perspektivoj de la spacaj kaj tempaj infinitoj serĉas la ideon de la Kreinto kaj la sencon de la dolorplena ekzisto de la vivantaro. La fundamento de lia viv-koncepto estas la frateco de ĉiuj estaĵoj. Li postlasis kvin poem-ciklojn: La misteraj malproksimoj, La tagiĝo en okcidento, La ventoj de la polusoj, La konstruantoj de la templo, La manoj. La poezia lingvo de Brezina estas mirinde riĉa, himne ekzalta kaj nesuperebla en la metaforoj.

Pri la poemo Printempa Nokto

La poemo estas el la ciklo La manoj (aperis 1901). En ĝi la poeto prikantas la forton de la frateco, al kies ama gesto ĝoje respondas ĉiuj harmonioj de la Kosmo.

Pri la poemo Diritrambo de la Mondo

La poemo estas el la ciklo La manoj (aperis 1901). Estas patosa kosmogonio, kapturna bildo skizanta per aŭdacaj metaforoj la estiĝon kaj formortadon de la astro-sistemoj. La senmezura daŭro de ilia arĉa kaj brilanta vivo estas nur efemera, fulmrapida sparko sur la klingo de la tranĉilo, per kiu la Kreinto greftas la arbon de la Evoluo. Ĉiu el la laŭvice sekvantaj mondoj estas ŝtupo al pli alta, pli spiriteca grado de la supren kondukanta vojo. La naskiĝantaj teroj akceptas el trans abismoj de la tempo kaj spaco semon de la vivo, el kiu elkreskas ĉiam novaj fluoj, novaj riveroj da ekzisto, novaj amasoj da sentemaj kaj kreemaj animoj. Ankaŭ la neevitebla perejo de ĉiuj sunoj ne estas fino de ĉio, ĉar nova kosmo leviĝos fenikse super ilia tombo.

Kaj tra la tuta Universo sonas harmonio, ĉe kiu, kvazaŭ ĉe la tonoj de patrino lulkanto, balanciĝas la teroj. Sur ili ripozas, kiel en lulilo, vivantoj kies spiritoj estas pretaj ekflugi el la hejma nesto al pli altaj sferoj.

Galaksio: sistemo de multaj miliardoj da astroj.

Golfa fluo: varma rivero en la Atlantika oceano, fluanta de la bordoj de Meza Ameriko al la bordoj de la okcidenta kaj norda Eŭropo. Sub la influo de ĝia varmo degelas la glaciario en la arĉa regiono. Ĉi tie ĝi simbolas la forton de la amo, kiu revivigas la mortintajn mondojn.

Protuberanco: giganta erupcio sur astro.

La sinjorino, kiu lule kantas al siaj naskitoj, estas la Naturo.

Tomáš Pumpr



Literatura Rubriko

KUN LA KADAVRO DE L' EDZINO, la raportaĵo pri la iama atombomba katastrofo tra Hiroŝima, verkita de prof. T. Ogura; tradukita de S. Tanaka; eldonita de Japana Esp-a Librokooperativo (Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodo-ku, Osaka, Japanujo); formato: 12,5 × 18 cm.; 52 paĝoj kun 8 ilustraĵoj kaj 1 landkarto; prezo: 6 resp. kup.

En la fatala tago, 15^a minutojn post la 8-a en la 6-a de aŭgusto, 1945, la aŭtoro, profesoro de Hiroŝima Universitato, estis sur strato 4 kilometrojn oriente for de la 'eksplozcentro', revenvoje hejmen de sia frumatena okupo. Post kelkaj horoj de tiu momento li eksciis ruiniĝon de la urbo Hiroŝima. Dum kelkaj tagoj en profunda malespero li vagadis sur la infere naŭzaj stratoj, plenaj de 'bruligitaj homaj palisoj' nudaj aŭ duonnudaj, aŭ de bruligitaj kadavroj, ĝis li fine trovis hazarde siajn edzinon kaj infanon. Tamen lia ĝojego pro renkontiĝo ne daŭris longe: la malsano de lia edzino, komence aspektinta negrave, iom post iom prezentis terurajn simptomojn: vomado, senapetito, ne-regula menstruo, sangado, laksado kaj alta febro. Jen la jam konataj karakterizaj simptomoj de la atom-malsano, sed kiu tiam povis diagnozi tion kaj kiu tiam povis fari taŭgajn alopatiojn! Post du semajnoj ekde la bombeksplozo ŝia pulsado fine fariĝis tute ne sentebla...

En la fina parto de la verko la aŭtoro modeste esprimas ke li neniel sentas sin ĉeffiguro de la viktimoj en Hiroŝima, sed estas nur "ekstra aktoraĉo," kiun

anstataŭi ja povas ĉiu ajn alia. Jes, oni ne forgesu, ke la similaj, eĉ pli severaj sortoj tiam atakis entute 400 mil urbanojn (70 mil familiojn). Tamen la travivaĵo de la aŭtoro per si sola jam sufiĉas por naski en la koro de la legantoj abomenon pri milito.

Esp-istoj en la mondo rememoros pri la libro, "Infanoj de l' Atombombo", kiu estis eldonita de la sama eldonejo antaŭ tri jaroj. Ĝi estis kolekto de senartaj vortoj de geknaboj travivintaj la tragedion, dume la nuna estas verko de unu maturaĝa inteligentulo. La karaktero kaj postlega impresado de ambaŭ libroj estas diferencaj, sed mi akcentas, ke ambaŭ ja estas unikaj legaĵoj, kiajn prezenti al la mondo povas fari sole Japanoj.

Lingvaĵo estas bona. Cetere, ilustraĵoj de fame konataj artistoj Maruki kaj Akamacu efike profundigas la simpatian kaj emocion de l' leganto.

La nukleaj armiloj lastatempe ne plu estas monopolaĵo de du-tri grandpotencoj; tial fariĝis tiom pli necesa la diskonigo de iliaj teruraj efikoj.

La legon de tiu ĉi dokumenta raportaĵo mi emas rekomendi al ĉiuj ŝtativiroj kaj militamantoj de la mondo, pli ol al denature pacamaj esp-istoj, por ke ili momenton paŭzu kaj okupiĝu por ŝanĝi anstataŭ la mondkarton — sian koron!

(N. E.)

DU MALSANOJ EN ESPERANTO, la originala verko de H. A. de Hoog; eldonita de Erik Carlén (Hällabrottet, Svedujo, poŝtĝiro 343481); formato: 12,5 × 18 cm.; paĝoj 140; prezo 4 svedaj

kronoj + 10% por sendkostoj.

La aŭtoro avertas logikemajn simpligantojn de Esperanto pri la "malsana" uzado de kelkaj korelativoj, nome "kiasmo" kaj "tiom-kiom-ismo". Laŭ li naivaj logikuloj instruas, ke "post *tia* ja povas logike sekvi nur *kia*" spite arojn da riĉe variaj esprimmanieroj de Zamenhof: *tia... kiel, tia... kia, tia... kiu, tia* (aŭ *tiu*) *sama... kiel, tia sama... kia, tiu sama... kiu*, ktp., aŭ ke "*tiom* povas logike nur esti sekvata de *kiom*" blinde al la Zamenhofaj: *tiom... kiom, tiom multe kiom... , tiom multe... kiel, tiom same kiel, tiom same... kiel*, ktp.

En sia detala traktaĵo en 20 ĉapitroj kaj 107 paragrafoj la aŭtoro kontraŭbatalas la "terurajn simpligantojn," kiuj ne faras distingojn kaj kunbalaas ĉiujn kazojn en unu grandan rubaĵon, kaj li konkludas ke la Zamenhofa uzado estas neniel nekonsekvencaj kaj kaprica, sed estas konscie regula, laŭ ĝeneralaj sintaksaj motivoj.

Estas rimarkinde ke la tiel terura "malsano" ekzistas inter esp-istoj, kaj mi mem rekonis ke ankaŭ mi estas venenita de ĝi. Lingvaj "malsanoj" ofte disvastiĝas rapide kiel influenco, sed male al la suferantoj de influenco, la infektitoj de lingvaj "malsanoj" ne rimarkas simptomojn. Mi kredas, ke la kaŭzo de la "malsanoj" kuŝas en la kursolibroj, kiuj instruas nur fundamentajn regulojn kaj ne donas pli da detaloj pri la temo, pritraktita en tiu ĉi libro. Kiel ajn estu la kaŭzo, se esp-isto dezirus certigi, ĉu sana aŭ malsana, li nepre konsultu la libron "Du Malsanoj en Esperanto", bona kuracisto, kiu liveros sufiĉe bonan dozon da medikamento.

Bela preso sur bonkvalita papero plaĉos al ĉiuj. Nur unu makulaĵo estas troa multeco de preseraroj. (N. E.)

SENNACIECA REVUO 1954, eldonita kaj redaktita de S.A.T. (67, Avenue Gambetta, Paris 20); 58 paĝoj; formato: 18 × 22,5 cm.; prezo: 4 ŝ. Afr. 2p.

Eble ĉiu dezirus nepre havigi al si la revuon, se li estus esp-isto, nur ĉe vido de la tabelo de ĝia riĉa enhavo.

Jen la listo de la ĉefaj temoj pritraktitaj kaj nomoj de la verkintoj:

Hektor Hodler (E. Privat), Problemoj (H. W. Alings), Socialismo kaj morala perfektigo de la homo (Laurat), De Moseo ĝis genocido (I. Gomes Braga), Fe-Faskoj (P. Neergaard), Nebulo super la Rivero (F. Szilagy), Lingvaj bahilaĵoj: Pri lingvodiverseco ktp. (Régulo Perez), Laŭ mia... Ridpunkto (R. Schwartz), Popoledukado en Francio (F. Baronnet), Superrigardo pri Aŭstralio (M. Leereveld), Ĉeftraĵoj de la kosmogonia problemo (F. Lindén), Kinematografio (Marso Dessoit), Niaj Dimanĉoj (R. Burnazel) ktp.

La parada elmontrito de la nomoj de kompetentuloj jam ne bezonigas al mi pluan mension pri la valoro de la enhavo kaj pri la meritoplena redaktado de S.A.T.

(N. O.)

LA ĈASTEKO DE JAPANINO, broŝuro pri memoraĵoj kaj historieto de panpanoj* en Japanujo post la mondmilito II; kompilita de s-roj H. Mizuno kaj C. Gotoo; ekstrakte esp-igita de s-ino Ĉ. Haĉija kaj aliaj virinoj; eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo (Nakacu-hamadoori, 2-20 Ojodo-ku, Osaka, Japanujo); formato: 13 × 18 cm.; 41 paĝoj; prezo 4 resp. kup. afrankite.

La verko konsistas el du partoj: "Japaninoj Plorsingultas" kaj "Historieto de Panpanoj". La unua estas memoraĵoj de 3 panpanoj pri iliaj suferoj kaj ĉagrenoj sub la juko de seksperfortado. La

* Panpano: prostituitino por alilandanoj.

alia estas historia traktaĵo pri panpanoj farita kunhelpe de civitanoj, ĵurnalistoj, laboristoj en militbazoj, panpanoj kaj usonaj kaj aliancaj soldatoj.

La mondmilito II naskis abomenindajn sociajn fenomenojn tra la mondo. Ankaŭ en Japanujo — venkita — aperis multaj sociaj problemoj. La problemoj de la panpanoj estas nur unu el ili. Oni sciis, ke la nombro de japanaj prostitu- itinoj estas tro malgranda por kontentigi la voluptamon de aliancaj soldatoj alvenintaj por okupado. Kiamaniere oni anticipis zorgis kaj aranĝis por forigi tiun ĉi mankon, kaj por minimumigi la kolizion okazantan inter la okupantoj kaj okupatoj, pri tio la broŝuro kuraĝe malkovras la tiamajn intrigojn de perfortistaj bandoj plenumitajn eĉ kunlabore kun policanoj. Por kontraŭ- batali ilin ordinaraĵ virinoj estis tro malfortaj kaj devis riski sian vivon: por gardi sian ĉastecon unuj sin mortigis, aliaj estis mortigitaj de usonaj soldatoj aŭ japanaj perfortistoj dungitaj de prostituistoj, sed la plejparto de ili nur "plorsingultis" pelante sin en inferon kun rezignacio.

Legantoj eĉ povus riproĉi la kompilintojn pro la tro realisma maniero de prezentado pri la krueleco kaj la malĉast- aĵo, tamen ili devas prikonsideri la fakton, ke milito pelas la homojn en malnormalan pensostaton kaj kondamn- anda estas ja la milito! Pri la malvirto de milito oni tamen forgesas kun la forpaso de l' tempo. Oni devas ĉiam ankoraŭ batali kontraŭ milito — la origino de ĉiuj sociaj malbonoj. El tiu ĉi vidpunkto la verko certe kontribuos grandefike.

(S. Takahaŝi)

KAJ TAMEN DIO ESTAS AMO. El la nederlanda originalo de d-ro F. W. A. Korff tradukis W. Versteeg-Graffdiik. Eldonis J. N. Voorhoeve (Dunne Bierkade 17, Den Haag, Nederlando). Formato:

12 × 19 cm.; 29 paĝoj; prezo 1 Gld.

Ĉiuj religianoj sendistinge pri la eklezioj, al kiuj ili apartenas, konsentas en sia kredo: Dio estas Amo. Sed, multaj homoj en la mondo nuntempe dubas la verecon de tiu tezo, tio ege ĉagrenas la aŭtoron. Laŭ lia aserto ĉiuj homaj estaĵoj senescepte estas pekuloj. La malbonoj ekzistantaj en la mondo kaŭziĝas de la misuzado de l' homa libervolo de Dio dotita. Kulpa estas ne Dio, sed la homaro. Kaj *tamen* Dio estas amo, la aŭtoro diras, kaj asertas, ke kiuj feliĉe posedas firman dikredon, certe povos supreniri la ĉielregnon. Simpla kaj laŭcele klara rezonado estas ĉarmo de tiu ĉi verketo. La bonecon de l' enhavo atestas ĝia enkonduka frazo — "De la originalo en Nederlanda lingvo aperis jam la 14-a eldono".

(Ŝ. U.)

GVIDILO EN ESPERANTO, la kvara eldono de la stenografia broŝuro de Heinrich Friess verkita kun iom da diferencoj el la instruoj de F. de Kunovski; eldonita de Tutmonda Iner- steno-Asocio; formato: 15 × 20 cm.; 8 paĝoj; prezo: 2 resp. kup. aŭ egalvaloro; havebla ĉe C. Daglio (Via Campanella N. 51, Tortona, Italujo).

RAPORTO PRI LA APLIKADO DE ESPERANTO EN DANUJO, redaktita de Paul Neergaard el la informoj kolektitaj de l' danaj Esp-organizaĵoj kiel la informilo al la danaj aŭtoritatuloj, kiuj devis raporti al la sekretario de Unesco okaze de la 8-a Ĝeneralkunveno en Montevideo; esp-igita de Gustav Kühlmann kaj Anna Riis; formato: 21 × 29 cm.; 7 paĝoj. La originala raporto kaj ĉi tiu tradukaĵo estas haveblaj por ĉiu Esp-organizaĵo aŭ unuopa kompetent- ulo, kiu volas ilin uzi propagandcele, kontraŭ 4 resp. kup., ĉe Centra Dana Esp-ista Ligo (Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N. Danujo).

Poŝtmarka Informo en 1954 (III)

Haruja Maekaŭa

10) 20, Novembro — Kajero de 10-ena poŝtmarko por Filatela Semajno.

Nur escepte la presitajn vortojn, la aspekto de tiu ĉi kajero estas tute sama kun la 9-a ekzemplo, kiun mi pritraktis en la lasta n-ro de OOMOTO. Ĉi tie do forestas la kliŝo. Pli frue ol la antaŭ- anoncita dato oni eldonis la kajeron kune kun la menciita. Sur la kajero estas la vortoj:

Adreso estu Korekta kaj Klara!

Ĉiu Utiligu dum Vojaĝo la Oportunan Poŝtan Leterfolion*!

Vendprezo: 100 enoj, Eldonita nombro (1-a preso): 300,000

11) 20, Decembro — Novjara poŝtmarko por 1955.

Valoro: 5 enoj, Koloro: karmina kaj malhele griza, Preso: fotografavura, Formato: 27 × 22.5%, Aranĝo de folio: 5 × 4 (20), Eldonita nombro: 5,000,000



Tiu ĉi poŝtmarko montras la lokan pupon de "Kaga" provinco, nuntempa Iŝikaŭa prefektujo, japane nomitan "Kaga Okiaĝari" aŭ "Hime Daruma".

* Tiu ĉi estas vendata por 11 enoj kun la afranko.

Popola Arto pri Pupoj

(6) Kokeŝi


Ke la pupo Kokeŝi havas nek manojn, nek gambojn, estas ĝia plej distinga karakterizaĵo. Tute simple kun la kapo kaj longa torso la solida materialo formas kompletan figuron. La abstraktita beleco de Kokeŝi estas unika, kvankam pli-malpli similaj pupoj troviĝas ankaŭ en Kaŭkazo kaj la norda Ĉinujo.

Ĝia origino estas en la nord-orienta parto de nia lando, tamen rilate la devenon oni havas diversajn asertojn. El ili la plej populara kaj aŭtentikeca estas:

Iam la loĝantoj de la montoriĉaj nord-orientaj provincoj de Japanujo multfoje suferis mankegon de nutraĵoj. Ili ĝenerale devis vivi tre mizeran vivon kaj tial ne ŝatis la naskiĝon de nova familiano. Iu el ili kreis lignan pupon ki el talismanen por eviti al si novnask-

iĝon. La farado de la pupo pli kaj pli disvastiĝis, ĝis ĝi furoris ĉe la popolo kiel ludilo. Laŭvorta signifo de Kokeŝi estas: *ko* = ideto kaj *keŝi* = nuligo.

Nuntempe diversspecaj Kokeŝi troviĝas en butikoj en ĉiuj partoj de la lando respektive kun karakterizaj trajtoj de la loko.



Parolas la Legantaro

★ S-ro *Pál Balkányi*, Budapest, Hungarujo

Kun ĝojo mi sciigas, ke la mondkonata hungara poeto, d-ro Kolomano Kalocsay, pri kiu en la lastaj jaroj oni supozis, ke li tute forlasis Esperanton, aliĝis al la Mondpaca Esperanto Movado kaj abonis la Pacon, esprimante sian opin'ion ke en tiu laboro oni povas kaj devas utiligi ankaŭ Esperanton. Li promesis ankaŭ sendi tradukon de pacpoemo kaj eble li helpos doni bazon al modesta hungara esperanta pacmovado.

★ S-ro *Karlo Karger*, Wiesbaden-Biebrich, Germanujo

Ĉiam denove mi sentas grandan ĝojon, kiam mi ricevas novan n-ron de via OOMOTO. Sed nur nun mi trovis tempon por denove kaj zorge trastudi la artikolon aperintan en n-ro 1-2 de 1952. Temas pri "Siria Nestorianismo en Japanujo" de prof. Sakae Ikeda. Mi ja scias, ke religio estas altnivela etiko kaj ke la Oomoto-movado en tiu rilato atingis altan rangon, tiel ke ĉiu leganto de la Oomoto-organo (ofte senkonscie) multe profitas nur legante la rezultojn de zorga studado. Pro tio mi skribas al vi, unue por elkore danki vin pro via ĉiama gvidemo.

Kun mia familio, forpelita el mia hejmlando Moravio (nune en Ĉeĥoslovaka Respubliko), senigita de ĉiu iama havaĵo, mi nun loĝas en Biebrich, antaŭa urbo de Wiesbaden (fama banloko germana). Post la alveno en Germanujon (dum unu jaro, de 1945 ĝis 1946 ni estis kaptitaj en tiel nomata K. Z.) mi klopodis komenci movadon por starigi E-feriejon. Eminentaj gesamideanoj kaj ankaŭ UEA aprobis mian agadon, sed la

ekonomia situacio devigis la EKO-movadon al apatia dormado. Intertempe mi maljuniĝis kaj nun mi estas devigata al rezignado. Sed la intereso por E samkiel por la interna ideo ne povas velki. Tial mi nun trastudas la verkaron de Martinus, eldonita de la Spirit-sciencia Instituto en Kopenhago.

Mi ne perdas la esperon, ke nia E-movado iam venkos ĉiujn barojn kaj eble tiam la gesamideanoj estos konvinkitaj pri la nepra neceso de internaciaj feriejoj kiel konvenaj lokoj donantaj ĉiaman okazon por konversacia rutino. Nur pro tio, ĉar (laŭ mia opinio) mankas al Esperantujo tiaj publikaj kunvenejoj, la plejmulto el la kursanoj restas dumvivaj E-sučinfanoj. Jam ofte konfesis al mi eminentulo el la politika aŭ ekonomia medio, ke li iam lernis Esp-on kaj ankaŭ ŝatas ĝin. Sed por konvinki la publikon ne sufiĉas aranĝi kursojn kaj grupajn kunvenojn. Kursanoj povas perdi la intereson kaj grupanoj jam pli-malpli uzas la komunan lingvon. Eble ili intencas perfektigi, sed tio povas esti ebla nur per konversacio — laŭeble kun fremdlandanoj. Ĉiu spertulo ja scias, ke eĉ esp-isto ofte emas enŝovi naciajn parolkutimojn en sia aplikado de Esp. Tion mi ankaŭ spertis dum ĉeestoj en E-Kongresoj, kie mi renkontis gesamideanojn el multegaj landoj.

La vojo de mia nuna letero estas longega, de Germanujo ĝis Japanujo. Spite tion, mi esperas, ke mia letero atingos vin kaj atestos al vi mian elkoran dankemon. Mi sincere salutas vin kaj esprimas mian deziron: Via "OOMOTO" restu tia, kia ĝi estis ĝis nun, modela gvidilo al homoj serĉantaj

harmonion inter "Kapo kaj Koro".

★ S-ro *Pál Balkányi*, Budapest, Hungarujo

Ĉiam estas festotago por mi, kiam alvenas nova n-ro de via bonstila, valorenbava revuo! Kiam denove etendiĝas al mi amika mano trans la oceanoj de fora, sed tre amika popolo, kiam malfermiĝas japana animo, japana kulturo, japana lukto por Amo, Belo kaj Paco! Danko kaj gratulo al vi!

Por iom rekompenci mi sendas apudajn artikolojn. Precipe vin interesos tiu de hungara reformita episkopo pri la mondkonferenco de protestanta eklezia konsilantaro en Usono, ĉar vin unuavice interesas ĉia religia afero, precipe se tio koncernas pacon, harmonian kunvivadon kaj la lukton kontraŭ la atombombo! Eble vi povas aperigi ĝin, precipe, ĉar ankaŭ japana delegito kaj ties tre saĝaj vortoj estas menciitaj! (vidu la lastan n-ron — Red.) La alia pri proksima Ĉinio povas interesi, precipe la japanajn legantojn, eble ankaŭ en via japana revuo.

Espereble vi jam anoncis vian partoprenon en la Pacmondkonsilantara laboro, kies centro estas nune en Vieno kaj ankaŭ helpas la Mondpacan Esp. Movadon!?

Mi foje petis hungaran agrikultur-instituton sendi al vi semojn, sed ne ricevis sciigon, ĉu io estis farita por vi.

Aparte mi dankas vian klopodon, sed speciale de s-ano Teruo Mikami (pro la NOTLIBRO kaj per tio por la pura uzado de zamenhofa Esperanto, por forigo de du esprimoj por sama vorto, kiam nenecesa balasto estas la novkondukita "eŭropa" fremdvorto, kvazaŭ montri ian superecon, elegantecon. Mi ankaŭ kritikis kaj kondamnas tion! "Nia lingvo ne falu en vortaran babelismon!" Jen estu via devizo! Se

eŭropanoj ne rimarkas tiom ties malĝustecon, almenaŭ vi, azianaj kunbatalantoj, gardu la ĝustan vojon kaj atentigu ĉiam la alinacianojn, ke Esperanto devas esti la facila, laŭeble logika, plej internacie uzbla kunligilo "por la tuta homaro — unu granda rondo familia". Ripete saluto al s-ano M.!


Iom ankoraŭ demandeto: vi okupiĝas multe pri la animo de la homoj. Mi legis foje rakonton de iu Lafcadio Hearn (mi ne scias, kiu li estis), ke li loĝante en via lando interparolis kun maljuna ĝardenisto, kiu klarigis al li, ke la homo povas havi du eĉ pli da animoj. Li mem havis kvar, kaj tio estas preferinda. Kelkaj eĉ meritas havi 9. Tiu animoj restas eĉ post la morto kune, post morto ili restas 49 tagojn sur la tegmento de la domo de la mortinto (sep semajnojn). Se mankas el la animoj, la homo fariĝas frenezulo. Interesa okazintaĵo estis: se iu viro (aŭ virino) volis scii, kio estas ŝia (aŭ lia) vera opinio, pensado de tiu knabino (aŭ fraŭlo), kun kiu li (aŭ ŝi) intencis edziĝi, oni povis fari ceremonion per taŭga pastro, kiu faligis la koncernan personon en dormon kaj dumtempe ties unu animo aperis en la pastro kaj per ties buŝo devis tute vere diri, ĉu li (aŭ ŝi) amas la alian, aŭ ne? Tiamaniere la rakontita ĝardenisto mem evitis edziĝi kun knabino, kiun la gepatroj rekomendis, sed kiu sekrete ne amis lin, sed iun alian. Ĉu tiu fantazia superstiĉo aŭ kredo havas ian bazon en via landa popola kredaro?

(Noto de Red. Lafcadio Hearn, japaniĝinta angla verkisto, 1850-1904, skribis multajn tiajn folklor-rakontojn de Japanujo, bazitajn sur la budaisma animismo.)

Popola Arto pri Pupoj

(7) Pajla Ĉevalo

La matenon de la 7-a de julio laŭ la luna kalendaro, en la Orienta-Kantoo kaj Nagano Regionoj oni renkontas tie kaj ĉi tie strangajn procesiojn de vilaĝaj geknaboj.



Ili procesie marŝas sur kamparo kolektante miskantojn*, trenante meze de si pajlan ĉevalon de alteco je ilia genuo — kvazaŭ ili estus servantoj al ĝi.

Kun plenbrako da miskantoj ili hejmeniras, metas en la korton la pajlan ĉevalon kune kun bovo el pajloj kaj antaŭ ĉi tiuj ili oferas riz-kukojn kaj la miskantojn kolektitajn, kaj post momento da preĝo ili suprenjetas sur la tegmenton la kukojn kaj miskantojn.

Laŭ la orienta legendo, en tiu ĉi tago Altajro rajdante sur bovo kaj Vego sur ĉevalo proksimiĝas al Laktovojo por renkontiĝo unufoja en jaro. Per la supre-dirita festo-servo nomata "Tanabata-macuri" la geknaboj montras sian infanan simpatian al Altajro kaj Vego por ilia sukcesa kaj feliĉa intervidiĝo. Konservante la multjaran tradicion de la antikvuloj, maljunuloj en la regionoj lerte faras pajlajn ĉevalojn kaj bovojn. Ĉi tiuj vendiĝas popare. La profito ĝenerale fariĝas la poŝmono de maljunuloj.

* Japane: Kaja aŭ Susuki, speco de herbaĵ vegetaĵoj por furaĝo.

Esperanto uzota en grava internacia ekspozicio!!

La Aŭstralia Asocio de Model-Societoj aranĝos dum Aŭg/Sept. 1955 sian 5-an Grandan Internacian Foiiron de Modeloj en Melburno. Ĝi okazos en la plej granda ekspoziciejo de la suda duonsfero kaj oni atendas proks. 250,000 vizitantojn. La organizantoj disponigos al la Aŭstralia E-Asocio senkoste grandan standon kie oni montros modelojn ensenditajn de E-istoj tutmondaj.

La organizantoj serĉas bonajn modelojn de ŝipoj, vagonaroj, aŭtomobiloj, motorboatoj, aeroplanoj kaj aliajn modelojn kiuj respeguligos naciajn karakterojn. Modelojn kun priskriboj (en Esperanto) oni sendu ĝis la 15-a de Julio 1955 al: Aŭstralia Esperanto-Asocio, Box 2122 T, Elizabeth St., Melbourne, Aŭstralio.

La organizantoj pagos la koston por resendi la modelojn post la ekspozicio.

Aŭstralia Esperanto-Asocio
Aŭstralia Asocio de Model-Societoj

Insektomanĝaj plantoj en Japanujo

de

S. HORI*

La plej kuriozaj specoj de insektomanĝaj plantoj estas sendube tiuj de *Nepenthaceae*^①. En Japanujo ili povas kreski nur en varmejo; sed oni trovas ĉ. 50 specojn de ili en Malaja duoninsulo kaj Borneo, kie kredeble estas iliaj originejoj. La centra strio de iliaj folioj plilongiĝas kaj portas ĉe fino strangan saketon, kiu montras bone konatan strukturon por kapti insektojn.

En nia lando oni ne trovas insektomanĝajn plantojn tiel strangajn kiel *Nepenthaceae*; oni tamen havas kelkajn reprezentantojn divideblajn en du grupojn:

La unua grupo entenas: *Pinguicula vulgaris* L.^②, *Drosera rotundifolia* L.^③, *Aldrovanda vesiculosa* L.^④, *Drosera pelata* Sm., var. *lunata* Clarke^⑤, *Pinguicula ramosa* Miyoshi^⑥, ktp. Iliaj folioj posedas multe da delikataj haretoj, kiuj sekrecias mukon, per kapti insektojn, kaj poste eligas sukcon por digesti ilin.

Pinguicula vulgaris L. estas ne tre rara en Eŭropo kaj en sudorienta parto de Nord-Ameriko, sed en Japanujo oni renkontas ilin nur sur la montoj kiel Jacugatake, Ŝirouma-dake, Togakuŝijama, Tanigaŭa-dake, Akagi-jama, ktp. Sur la folioj troviĝas multe da haretoj, kiuj sekrecias senkoloran gluecan mukon, per kiu la planto kaptas malgrandan insekton, kiu neatendite ripozas sur la folio. Vana penado de la insekto por

sinliberigi stimulas la haretojn kaj plimultigas ilian sekreciacion, kaj la folio samtempe envolas la viktimon ekde sia rando. Nia eksperimento montras jenan faktan: ni metis malgrandan pecon de viando sur la folion. La sekreciita muko, komence neŭtra, fariĝis rimarkinde acideca post 40 minutoj; la peco de viando iom post iom malgrandiĝis kaj post 48 horoj ĝi tute malaperis. La haretoj certe sekrecias fermenton (enzyme), simile al Pepsinaseo, kiu funkcias plej forte en la acideco de PH. 1.5.

Drosera rotundifolia L. dise troviĝas en tuta Japanujo; ĝi kreskas prefere sur malsekaj lokoj en montoj, precipe kune kun Sfagnoj (*Sphagnum*). Oni renkontas jenajn specojn de *Drosera*: *D. rotundifolia* L., *D. spathulata* Labillard^⑦, *D. anglica* Huds.^⑧, ktp. La lasta estas rara speco trovebla nur en Oze kaj Hokkaido. La folio de *D. rotundifolia* L. estas kulerforma, iomete kava en la mezo. Haretoj sur la folio estas 7-8 mm longaj en la randa parto, kaj pli mallongaj en la meza parto. Kiam malgranda insekto ekhaltas sur la folio, la haretoj ĉirkaŭ ĝi ekkliniĝas kontraŭ ĝin; la movado incitas aliajn haretojn sinsekve. Ili nun sekrecias acidan mukon, kiu kolektiĝas en la meza parto de la folio kaj dissolvas la insektan korpon. Poste ili ĉesas sekrecii la mukon, kaj komencas

* Profesoro de Gunma Universitato

① ッツボカズラ ② ムシトリスミレ ③ モウセンゴケ ④ ムジナモ ⑤ イシモチソウ ⑥ コウシンソウ ⑦ コモウセンゴケ ⑧ ナガバノモウセンゴケ

digesti la "nutraĵon".

Aldrovanda vesiculosa L. estas rara speco dise trovebla en diversaj mondpartoj. Oni malofte trovas ĝin sur staranta akvo de marĉoj, rizkampoj kaj riveretoj de Kanto-distrikto. La folio, kvazaŭ konkulo duone malfermanta siajn du konkojn, havas multe da haretoj sur ĝia interna surfaco, kaj kiam malgranda

animalo naĝanta en akvo tuŝas la folion, ĝi tuj kaptas ĝin kaj enfermas ĝin en sian internon.

La movado por kapti insektojn okazas laŭ du procedoj ĉe *Aldrovanda vesiculosa* L.: la ferma movado de la folio kaj ĝia mallarĝiĝo por enfermi insekton. La tempo ekde la stimulo ĝis la komenco de la movado daŭras ordinaro ĉirkaŭ



Insektomanĝaj plantoj en Japanujo

1. *Pinguicula ramosa* Miyoshi こうしんそう 2. *Drosera peltata* Sm. var. *lunata* Clarke いしもちそう 3. *Aldrovanda vesiculosa* L. むじなも 4. *Drosera anglica* Huds. なかばのもうせんごけ 5. *Drosera rotundifolia* L. もうせんごけ 6. *Utricularia japonica* Makino たぬきも 7. *Utricularia bifida* L. みかぢきぐさ 8. *Pinguicula vulgaris* L. むしとりすみれ
(El la plantbildaro publikigita de Dr. T. Makino)

0.1 minuton, minimume 0.03 minuton. La unua movado bezonas nur 0.01 — 0.02 minuton, la plej rapidan sentemecon al tremado, kiun oni trovas en la planta regno, kaj la dua kelkdek minutojn.

Pinguicula ramosa Miyoshi, *Drosera peltata* Sm. var. *lunata* Clarke kaj *D. indica* L.^①. ankaŭ kaptas malgrandajn insektojn sammaniere kiel supre skribite.

Al la dua grupo de la insektomanĝaj plantoj apartenas tiuj, kiuj posedas malgrandajn saketojn transformitajn de la folioj: *Utricularia japonica* Makino^②, *U. intermedia* Hayne^③, *U. minor* L.^④, ktp. Ili ĉiuj kreskas en akvoj aŭ sur malsekaj lokoj.

La malgrandaj sakoj, aligitaj al trunketoj aŭ folioj per mallongaj teniloj, havas enirejon, kiu posedas valveton malfermeblan internen. En la saketo troviĝas kvarbranĉaj organoj, kiuj eble servas por ensorbi kaptajon. Malgrandaj animaloj, kiuj tuŝas harojn ĉirkaŭ la enirejo, estas enkondukataj per la haroj en la saketon. Ili ne povas ree elveni el la sako, ĉar la valveto ne malfermas sin eksteren. La sako ne sekrecias digestan sukcon, sed la animaloj eble putras en la sako per putro-bakterioj

kaj la produktaĵo estas ensorbata per la organo supre menciita.

Utricularia bifida L.^⑤, *U. affinis* Wight^⑥, kaj *U. racemosa* Walp.^⑦ estas multjaraj plantoj, kaj kreskas sur malsekaj lokoj. Ili havas kelkajn sakojn, kiuj elkreskas el delikata subtera trunketo, kaj estas uzataj sammaniere kiel *U. japonica* Makino.

Kiom da nutraĵo la insektomanĝaj plantoj enprenas el kaptitaj animaloj? La plantoj ĝenerale kreskas en akvoj kaj en malsekaj lokoj, kaj ne havas sufiĉe ampleksan radikon; al ili mankas do plej gravaj nutraĵoj, kiaj nitrogeno kaj aliaj neorganikaj elementoj, kiuj eble estas liverataj de animaloj. Tio estas pruvita de jena fakto: *Utricularia japonica* Makino floras kaj portas semojn eĉ sen insektoj; sed se oni donas al ĝi insektojn, ĝiaj semoj fariĝas trioble pezaj kompare kun tiuj de la planto nenutrita.

Konklude oni povas diri, ke la insektomanĝaj plantoj povas plenumi karbasimiladon (autotroph); krome ili enprenas ne nur neorganikajn salojn, sed ankaŭ organikajn kombinaĵojn el kaptitaj animaloj.

- ① ナガバノイシモチソウ ② タヌキモ ③ コタヌキモ ④ ヒメタヌキモ
⑤ ミミカキグサ ⑥ ムラサキミミカキグサ ⑦ ホザキノミミカキグサ

Anoncetoj

S-ino Gertrud Heinrich (HINESCREEK, Albert, Canada) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun japanoj.

Spiritistoj! Gelernantoj deziras korespondi nur kun spiritist(in)oj de ĉiuj landoj. Adresu al: *Luz del Porvenir* (Sekretariejo de Esperanto) str. Monroe 4888 — Buenos Aires (Argentino)

S-ro Ivan Krouskey (Náchoz 802, Ĉeĥoslovakujo), studento de universitato (japanologo), deziras korespondi (Esp. aŭ japanlingve) kun japanoj pri kulturo, historio, literaturo ktp. Nepre respondas.

S-ro Johano Foster (Tally Office, Kinbeth, Tokoroa, New Zealand), 23-jara, deziras korespondi kun japanoj pri diversaj temoj, i. a. pri poŝtmarkoj.

Indekso pri OOMOTO 1954

Titolpaĝaj:

Oomoto en Tokio	1
Kio estas la vera?	2
Kiun vi elektas, vivon aŭ morton? ...	33
Arda Deziro por Paco Manifestita en la Petskribo kontraŭ H-bombo	65
Malfavora Perspektivo al la Unesko-Afero	97
Triumfa Paŝo de Esperanto	161

Religiaj kaj Filozofiaj:

Kreskanteco de l' Ĉiomo	6
La Bombo kaj la Biblio	70
Por defendo de l' "Tempo"	69, 100
Revoj kaj Realecoj	110
Dikredo estas Spontana	129
La kristanismo en la mateno de l' atomepoko	162
Memornoto de <i>Hidemaru Deguĉi</i>	3, 37, 98, 130

Pri-Esperantaj:

Testamento kaj aliaj kombinaĵoj	10
Informoj de la Akademio de Esp. ...	22
Esp.-Ekspozicio en Montevideo	54
La 41-a Japana Esp.-Kongreso	132

Diversaĵaj:

Porpacaj Movadoj	
Kio estas la movado de Monda Frateco?	20
Dua Azia Kongreso por Mondfederacio	21, 165
La Tutmonda Pacifista Konferenco en Japanujo	55
Konferenco de Nemembro-Ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj	82

La Rondo de Homaranoj	
Pripensu ĉi tiun rasan problemon	46, 72
Aggrincipoj de la Rondanoj	145
"Konohana-sakura"	8
Situacio de Nordo	40
Memkonsolaj Vortoj de l' Malsanulo	106
Fin-Rezulta Studo pri Debridemento de Ostartikaj Tuberkulozaj Fokusoj	107
Kontraŭ la A-bomb-Uzado Decidis la Mondkonsilantaro de la Eklezioj Protestantaj	143
Renkonto en Samara	147
Insektomanĝaj plantoj en Japanujo	189

Literaturo kaj Poemoj:

Interpaca Momento	146
Ni la pacon ĝuos	15
Vilaĝano kaj Serpento	45
Pruvita Fideleco	53
Rigardu Supren!	91
Printempa Nokto	179
Ditirambo de la Mondo	180

Serioj:

Kelkaj Komentoj el UHA-Ĵurnalo	13, 42, 79, 103
Japana Kulturo	16, 48, 74, 112, 137
Literatura Rubriko	23, 56, 84, 120, 156, 182
Parolas la Legantaro	26, 58, 88, 122, 154, 186
El Notlibro Esperantista	28, 60, 92, 124, 156
Popola Arto pri Pupoj	87, 105, 111, 185, 188
Poŝtmarka Informo en 1954	118, 148, 185

